

Prezentostoko de Mikaelo Bronŝtejn

Movado

1. *SEJM legendara (45-90 min);*

Sovetia Esperantista Junulara Movado, la neformala organizaĵo, estis fondita en Soveta Unio en 1965 kaj dum 13 jaroj sukcese agis kaj evoluis, spite al neglekto aŭ eĉ kontraŭstaro de ŝtataj instancoj.

Sendube, tiaspeca funkciado enhavis aron da okazintaĵoj, interesaj ne nur de historia vidpunkto. La libro “Legendoj pri SEJM”, verkita de Mikaelo Bronŝtejn kaj reeldonita trifoje (1992, 1997, 2005), estas vaste legata en Esperantujo. Originala kompono de la prelego enhavas ankaŭ laŭtemajn kantojn kaj poemojn de la aŭtoro.

2. *Zamenhof kaj Postnikov – idealo kaj aventuro (60 – 90 min.);*

Aleksandr Aleksejeviĉ Postnikov (1880 –1925) estas la homo, memorinda ne nur pro sia aktivado poresperanta, i.a. organizo de la unua Ruslanda E-kongreso en Peterburgo (1910), sed ankaŭ pro la unua oficiala juĝproceso kontraŭ esperantisto, okazinta en 1911. La du vivojn, kaj du vojojn por antaŭenmovi la ideon analizas Mikaelo Bronŝtejn en sia prelego, atentokapta, kiel krimromano. Cetere, en 2004 estas aperinta lia romano “Dek tagoj de kapitano Postnikov” (reeldonita en 2010), kies kerno iĝis la proponata prelego.

3. *Mi stelojn jungis al revado... (60 – 90 min)*

(Ekflugo kaj falo de SEU – la plej forta landa E-asocio)

Dum multaj jaroj estis skrupule kolektataj materialoj por la nova romano, verkata nun de Mikaelo Bronŝtejn. La dokumentoj, eltrovitaj en la plej famaj bibliotekoj de Moskvo kaj Sankt-Peterburgo, atestoj de la forpasintaj esperantistoj tiuepokaj, arkivaĵoj, akiritaj diverslande, fidine montras la dudekjaran marŝadon de Sovetrespublikara Esperantista Unio supren – al la zenito de sia gloro – kaj poste suben – al plena perejo, konvinke prezentante la kaŭzojn de tiaspeca finalo.

4. *Sonato pri enterprenado (Spertoj de espa enterprenisto) (60-90 min.);*

Estis hela revo de la Majstro ke Esperanto havu elstaran rolon unuavice kiel helplingvo por komercistoj kaj enterprenistoj. La historiŝatantoj memoras, ke jam en la Unua Libro aperas la ekzemplo de komerca letero. La preleganto, nereedukebla poeto kaj kantisto, sonatforme prezentas siajn spertojn pri uzo de nia lingvo en la sfero de enterprenado kaj komerco. Eble iu aŭskultanto trovos la sonaton tro idilia aŭ kontraŭe tro kritika... do, disonancantoj bonvenas.

5. *Akceptu mondo min amike, aŭ sperto vojaĝi en Esperantujo (60-90 min.);*

La iama Sovetunio formis el inter siaj civitanoj la kaston, nomatan “Neviježdnyje”, t.e. personoj, kiujn la ŝtato senigis je rajto eliri trans la limojn de la lando. La preleganto havis malbonŝancon aparteni al tiu kasto do, nur rezulte de certaj politikaj ŝanĝoj, ekde 1990 li sukcesis ekvojaĝi eksterlanden. Dum la pasintaj dudek jaroj estis vizititaj kelkdek landoj en kaj ekster Eŭropo, sed speciala karakteriza trajto de ĉiuj vojaĝoj estas ke ili okazis en Esperantujo – per invitoj de esperantistaj kolektivoj kaj ĝenerale por propagandi la internacian lingvon. Nun ankaŭ vi povas ekscii pri la unikaj spertoj vojaĝi en la monda Esperantujo. Per amuzaj historietoj, poemoj kaj kantoj ĉion ĉi prezentos mem la spertinto, Mikaelo Bronŝtejn.

6. *Sagao pri Simeono (60 min)*

Simeono Podkaminer (1901 – 1982) estis unu el la plej elstaraj personoj dum la renaskiĝo de Esperanto-movado en Soveta Unio post la Dua mondmilito. Sed ankaŭ pli fruaj jaroj de lia vivo estis firme ligitaj kun la movado. Reorganizanto de la Petrograda societo “Espero”, sekretario de LKK de la Kongreso de SAT en Leningrado (1926), vicprezidanto de MEM kaj de ASE,

profesoro, doktoro de teknikaj sciencoj - tiu persono havis ankaŭ aliajn brilajn vojetojn en la biografio. Rakontos kaj ilustras per fotoj kaj dokumentoj Mikaelo Bronŝtejn.

Kulturo

1. *Min trafis feliĉ' esti rusa poeto... (60 min);*

Nomante la aron da plej famaj rusiaj (sovetiaj) poetoj de la dudeka jarcento, oni trovas kun miro, ke pli ol duono el-inter tiu brila aro havas judan devenon. Neniam antaŭe judoj tiom aktive partoprenis en la ruslingva verka proceso, kaj neniu alia etno de la multnacia Ruslando faris tiom gravan enspezon por riĉigo de la rusa literaturo. Sen ajna ŝovinismo esplorante tiun fenomenon, Mikaelo Bronŝtejn tradukis po kelkajn poemojn de la plej famaj rus-judaj poetoj – Boris Pasternak, Eduard Bagrickij, Samuil Marŝak k.a. La tradukoj formis libron “Min trafis feliĉ' esti rusa poeto...”. Atentokaptajn biografiojn de la poetoj kaj iliajn elstarajn verkojn prezentas la prelego.

2. *Aleksandr Puŝkin – vivo kaj kreado (60 min);*

“ Suno de rusa poezio, nia ĉio...” – tiujn titolojn oni jam dum pli ol ducent jaroj atribuas al Aleksandr Sergejeviĉ Puŝkin. La biografio ekstreme eventoriĉa, kaj la geniaj kreaĵoj de tiu Homo – jen estas la temo de la prelego, ilustrata per multaj poeziaj tradukoj kaj kantoj de Mikaelo Bronŝtejn, dediĉitaj al la genia poeto..

3. *De nenie kun amo... – la rakonto pri Joseph Brodskij (60 min);*

En 1987 poeto Joseph Brodskij ricevis Nobelpremion en la literatura branĉo, iĝinte la plej juna Nobelpremiito pri literaturo. La eventon antaŭis la ekstreme streĉita vivo – juĝproceso kaj ekzilo en la Patrolando, elmigro al Okcidento kaj ĉiutaga pena literatura laboro. Multaj verkoj de Brodskij, dediĉitaj al Litovio, la lando, al kiu li havis speciale varmajn sentojn, eniris la libron « De nenie kun amo... » La libron kune kun la rakonto pri la eventoriĉa vivo de la poeto prezentas la tradukinto Mikaelo Bronŝtejn.

4. *La mondoj de fratoj Strugackij (60-90min)*

Kio estus okazinta, se...? Ekzemple, se terano - spacesploristo trafu la planedon kun homeca civilizo simila al la tera mezepoko? Aŭ se ekzistu speciala esplorinstituto pri magio kaj misteroj? Aŭ se du mondoj, paralele ekzistantaj en la tempofluro, ek esploru unu la alian? Aŭ... Ĉiam ekstersupozan, rave atentokaptan respondon al tiuj demandoj donas verkoj de la brilaj inventistoj de situacioj, plej famaj sciencfikciaj verkistoj de Rusio, fratoj Arkadij kaj Boris Strugackij. Laŭ kontrakto, signita de eldonajo “Impeto” kaj la aŭtoro en 1996, dek du romanoj de fratoj Strugackij rajtas aperi en esperanto. Ĝis nun estas aperintaj naŭ, kaj la laboro daŭras. Mikaelo Bronŝtejn prezentas la fratojn Strugackij - ilian ekstreme malfacilan, obstinan iron al monda rekono, verkojn la plej ŝatatajn kaj amuzajn eventojn dum lia traduka laborego super tiuj verkoj.

5. *La rusoj en la literaturo de Esperantujo (60 – 70 min)*

Se oni konsideru, ke mem la Majstro estis rusparolanto, oni povas aserti, ke la Esperanta literaturo naskiĝis samtempe kun la lingvo en Rusio. Ekde 1887 ĝis la nuna tempo la rusoj faris tre gravan enspezon en ties trezorojn. Mikaelo Bronŝtejn prezentos al vi la historion de tiu enspezado, recitos la verkojn de famuloj kaj de junaj talentuloj por pruvi la vivecon de Esperanta kulturo kaj speciale de la literaturo en Rusio.

6. *La lingvoj de miaj gentoj (60 – 90 min)*

... Zamenhofeca etoso de la okcidentukraina urbeto post la Dua mondmilito. Samstrate loĝas, amikiĝas, kunludas geknaboj rusaj, ukrainaj, hebreaĵ, polaj, ciganaj. Ne gravas por ili la lingva

problemo, ĉar ekde la naskiĝo ili ekparolis ĉiujn lingvojn de la strato. Pri la etoso de tiu kunvivado kaj aparte pri ĉiu el la tri ĉefaj lingvoj rakontas kaj kantas Mikaelo Bronŝtejn.

7. *Rusiaj bardoj de la 20-a jarcento (60 - 90 min)*

Post Stalin kaj post jardekoj de terura subpremo kaj humiligo, Sovetio venis nelonga periodo de relativa liberiĝo, kaj unuavice tiu liberiĝo tuŝis kulturan vivon de la popolo. I.a. ĝuste en tiu periodo en la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento, ekĝermis tute nova kanta ĝenro – tiu de amatora barda kanto – kiel opozicia respondo al la kantaro, prezentata en oficialaj amaskomunikiloj. La barda movado sen oficiala ŝtata subteno, sed ankaŭ sen persekutado de la ŝtato, ne opinianta ĝin danĝera, envolvis dekmilojn da junaj adeptoj. Ĉiujaraj festivaloj de barda kanto, ekintaj ĉe Volga-rivero, kunvenigis ĉiujare ĝis 250 mil partoprenantojn. Mikaelo Bronŝtejn prezentas la plej eminentajn rusajn bardojn, ilustrante la prezentadon per propraj kantotradukoj.

8. « *Esperantujo – amata tero!* » (60 – 70 min)

Esperanta barda kulturo, dum la lasta duonjarcento ekzistanta kaj bone evoluanta en Sovetio/Rusio, restas preskaŭ nekonata por la monda esperantistaro. Ne multaj scias, ke la postmilita renaskiĝo de E-movado en Sovetio okazis gravparte dank' al la kantoj, ke la unuaj poramasaj kanto-lecionoj okazis en SEJT (Sovetiaj Esperantistaj Junularaj Tendaroj), ke la renkontiĝoj de Esperanto -kantistoj okazadis ekde la okdekaj jaroj kaj kunvenigis ĉiujfoje centojn da kantemuloj. Mikaelo Bronŝtejn malkovros la evoluon de esperantista kanta kulturo en Rusio/Sovetio, nomos la plej famajn kantistojn kaj ilustras la rakonton per originalaj kantoj, plenumataj de diversaj aŭtoroj.

9. *La verkoj kaj vivtragedio de Osip Mandelŝtam*

La komencon de la 20-a jarcento oni nomas la Arĝenta epoko de la rusa poezio. Osip Mandelŝtam estas unu el la plej elstaraj poetoj de tiu epoko, cetere, laŭ opinio de Anna Aĥmatova, li estas la plej grava rusa poeto de la 20-a jarcento. Pro rektaj mallaŭdaj poeziaj diraĵoj kontraŭ Stalin, la poeto estis kelkfoje ekzilita kaj poste pereigita de la reganto. Pri la vivo kaj verkoj de Osip Mandelŝtam rakontas Mikaelo Bronŝtejn.

Vivo

1. *Jen Vorkuta – (60 min.);*

En la tridekaj jaroj de la pasinta jarcento geologoj trovis altvaloran koakseblan karbon ĉe la rivero Vorkuta trans la Polusa cirklo. La karbo, bezonata por la landa industrio faris tiun nordan regionon parto de la fifama Gulag; la fervojo kaj la unuaj karbominejoj, lanĉitaj tie, kostis multajn milojn da homaj vivoj. Mikaelo Bronŝtejn, kiu dum naŭ jaroj mem laboris en la plej granda karbominejo de Vorkuta, prezentos enhavoriĉan rakonton kun propraj kantoj kaj lumbildoj pri tiu fora regiono.

2. *La miraklofara ikono de la Tiĥvina Dipatrino (60 min);*

La figuro de la Dipatrino en rusa ortodoksa eklezio estas la plej adorata post la figuro de mem la Savanto. Ekzistas kelkaj, laŭlegende, nemanfaritaj ikonoj de la Dipatrino, kiujn konas kaj adoras ĉiu ortodoksa preĝanto, ĉar tiuj ĉi ikonoj, onidire, portis multajn bonojn kaj savojn. Ekz. la ikono de la Kazana Dipatrino helpis venki la invadintojn, la ikono de la Starorusa Dipatrino savis la urbon dum la pesto k.t.p. Inter la plej adorataj miraklofaraj ikonoj vere elstaras la ikono de la Tiĥvina Dipatrino, pli ol 600 jarojn aĝa kaj konata tra tuta Rusio. Komencjulie 2004, la miraklofara ikono de Tiĥvina Dipatrino estis solene revenigita en la Tiĥvinan viran monaĥejon post 60-jara restado en Usono. La misteran historion pri la aventuroj de la ikono prezentas Mikaelo Bronŝtejn.

3. La ĉefurboj de la Rusa Ŝtato (70 min.);

Printempe de la jaro 2003 rusiaj vojkonstruantoj urĝege sed bonkvalite riparis la 120-kilometran ŝoseon de Sankt-Peterburgo ĝis la rivero Volhov. Ĉu tio estis farita pro la 300-jara jubileo de Sankt-Peterburgo? – Tute ne. Apudis ne tro vaste konata, sed ankaŭ grava historia datreveno – la 1250-jariĝo de Staraja Ladoga, la unua rusa ĉefurbo. La jubileo tamen estis agnoskita, kiel ŝtate grava, ĉar venis al Staraja Ladoga mem la prezidento Vladimir Putin. Jen por kiu estis riparita la ŝoseo...

Dum la pasintaj 1250 jaroj la rusoj pli-malpli regule translokigis sian ĉefurbon, kaj la historio de ĉiuj translokigoj estas treege amuza kaj instrua. Pri ĉiuj urboj, kiuj rolis kiel rusaj metropoloj rakontas la preleganto.

4. Retrospektivo de rusaj festoj (70 min.);

Festotagoj, ĝojigantaj la vivon de homo post streĉa laboro, estas kutimaj kaj atendataj en ĉiuj landoj. Sed versimile nur la rusoj posedas tiun ravan tohuvabohuan festaron, en kiu kirle miksiĝis la festoj paganaj kaj kristanaj, internaciaj kaj komunistaj, ligitaj al historiaj eventoj kaj truditaj de la ŝtata gvidantaro. Bonvenon al la prelego, kie la aŭtoro, uzante vodkon, gitaron kaj videon, faros provon iel-tiel sistemigi la festaron, estimatan en Rusio ĝis la nuna tempo.

5. La rusa emo ĝardenumi(60-90 min.)

En la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento Nikita Ĥruŝĉov, tiama gvidanto de Sovetio, konjektis, ke la organizita agrikultura industrio de la ŝtato (kolĥozoj k.a.) ne sukcesas produkti sufiĉan provizostokon por nutri la loĝantaron. Do maturiĝis la decido, igi la civitanojn, ke ili (krom fari sian pagatan laboron) laueble ankaŭ nutru sin mem.

Tiucele estis produktita speciala leĝo, laŭ kiu dezirantoj el inter la loĝantaro de la lando povus ricevi senpage terpecon, sescent kvadratmetran por ĝardenumi tie. Miris la gvidantaro, ĉar tuj (kompreneble, pro manko de nutraĵoj en butikoj) sin anoncis milionoj da dezirantoj! La ĝardenista “movado” iĝis la plej amasa okupo en la lando.

Pri historio kaj evoluo de tiu unika eksperimento raportos denaska ĝardenisto Mikaelo Bronŝtejn, spicante la rakonton per ŝercoj, bildoj kaj kantoj.

6. La Katastrofo kaj ties bardoj (60 min)

En 2019, dum la turneo en Japanio, en du lokoj el kvar vizititaj, gejunuloj venis al mi kun demandoj: “Ĉu vere okazis la Holokaŭsto? Kaj se ĝi okazis – de kie venis tiu malamo al la juda popolo?” Preskaŭ samaj demandoj venadis ankaŭ en multaj aliaj landoj; tio atestas, ke la juna generacio de la mondo ne havas imagon pri la historio de la tragedio. De la plago, kiu fakte ekstermis la judojn en Eŭropo.

Jen estas la kaŭzo por prezenti la radikojn kaj la evoluon de la malamo, vere ne ĉesigita eĉ post la ekstermo de sesmiliono judaro. La prezenton formas:

1. Skiza analizo de la juda historio - ekde la praepoko ĝis la 20-a jarcento – faktoj kaj kalumnioj;
2. Rakonto surbaze de la verkoj de la senperaj atestantoj, la du elstaraj judaj bardoj, kiujn voris la Katastrofo. Mordeĥaj Gebirtig (1877-1942) kaj Ichok Kacenelson (1885-1944), la viktimoj de la nazia teroro lasis kantajn kaj poeziajn atestojn pri la kruelaĵoj;
3. Skizo pri la postmilitaj eventoj, aspirantaj al forgesigo de la Katastrofo.

7. Mondaj eklezioj kaj Esperanto (60 min)

Ekde la naskiĝo de Esperanto rilato de diversaj eklezioj al la lingvo estis elmontrata diversmaniere – de aprobo kaj subteno ĝis absoluta malakcepto. La prelego de Mikaelo Bronŝtejn tuŝos la eventojn de la pasinta jarcento, ne bone konatajn al laika esperantistaro, aŭ tute nekonatajn/forgesitajn, kia estas ekz. la kazo de la pastro Nikifor Zenin.

8. Koncerta programo kompilita el la originale verkitaj kantoj (60 – 90 min)

9. Aŭtora horo kun prezentado de freŝeldonitaj libroj kaj la plej novaj kantoj

10. Originala priesperanta kvizo (60-80 min)

Ĉe bezono eblas prezentado por loka neesperantista publiko – originale verkitaj rusaj kaj esperantaj kantoj kun iom da informoj pri Esperanto, kaj respondoj al la demandoj, kiuj interesas la publikon.